

## „POSTE NI SENĈESE ESTOS KUN SINJORO“

Ĉu ni antaŭsentas eternecon? Sanktuloj estis per „potencoj de la estonta mondo“ (Heb 6,5) tiel ekokupitaj, ke en ili estis profunda sopiro pri tiu ĉi alvenanta gloro: „Mi havas deziron morti kaj esti kun Kristo, kio estas multe pli bona. Tamen mia restado en la karno estas pli bezona por vi, por via progreso kaj ĝojo de fido...“ (Flp 1,23-24) Tiel tion travivadis Paŭlo: ardan sopiron pri tio „esti ĉe Dio“ kaj „esti ĉe Kristo“. Ĉar tio estas la ĉielo.

La surtera vivo kompare al tio estas kvazaŭ „la vivo en fremdlando“ (2 Kor 5,6). Vera patrujo estas la ĉielo! „Nia patrujo estas en la ĉielo.“ (Flp 3,20) Tiu „aero“, kiun Paŭlo povas spiri kaj en ĝi ĝoĵi, estas Dia Spirito, ĉeesto de Dio, medio de Dio, „la ĉielo“. La ĉielo konsistas por li en tio, por senĉese „vivi por la Sinjoro“ kaj ne plu „por si mem“. Dum la homo vidas nur sin mem, pensas pri si, vivas por si, zorgas nur pri sia bonfarto, li vivas „malpie“, apartigita de Dio, en la peko pro disiĝo de Dio.

Nur kiam Spirito de Dio malfermis okulojn kaj koron, ekkonas la homo tion eternan, konstantan, pli grandan, propran vivcelon, plenecon kaj sanktecon. Nur poste komencas sinfordonemo al senlime granda, sankta Dio: „Ĉar se ni vivas, ni vivas al la Sinjoro, kaj se ni mortas, ni mortas al la Sinjoro. Ĉu ni vivas, aŭ mortas, al la Sinjoro ni apartenas!“ (Rom 14,8)

„Fortoĵ de la estonta mondo“ komencas

per tio, ke niaj okuloj malfermiĝas pro Dio, pro lia gloro. Centro de nia vivo ŝanĝiĝas: Ni ne plu opinias nin kiel centron de la vivo, sed de nun la centro de nia vivo kaj mortado estas Dio, nia ĝojo kaj espero, nia forto kaj sciado. – Tio estas la momento, kiam nin vizitis Spirito de Dio: la Dio nin ĉirkaŭas per sia Spirito, per sia ĉeesto, per sia amo. Li nin faras unuecigitajn kun Dio! „Ne vivas mi mem, sed Kristo vivas en mi!“ (Gal 2,20) Tio estas la ĉielo, jam nun. Tio estas la ĉielo, kiu foje efektiviĝos. „Kristo en mi! Li vivas! Li plenigas min per sia pensado, per sia amo, per sia forto. Tio estas „fortoĵ de la estonta mondo“, fortoj de Kristo. Tio estas „la forto el altoĵ“, „forto de la Sankta Spirito“.

La ĉielo komencas jam ĉi tie surtere, se ni starigis Dion kiel centron de nia vivo kaj se ni plene nin direktas laŭ Li: „Celu unue Lian regnon kaj Lian justecon kaj ĉi tio estos aldonita al vi.“ (Mat 6,33) – Tiel kiel ŝtono ĵetita en la akvon kaŭzas ondojn kaj la ondoj disvastiĝas en cirkloj, tiel estas same kun nia sinfordonemo al Dio, se ni plene nin fordonas al Li kaj en Lin ni samtempe „mergiĝas“. Poste ekestas „cirkloj“ kiuj disvastiĝas: La cirkloj de la amo, la cirkloj de la forto, la cirkloj de la Dia ĉeesto. Se ni nin al Dio plene fordonas, en Lin „mergiĝas“, sekve sin mergas en nin amo de Dio: spirito de la amo, spirito de Dio, ĉeesto de Dio... ■

*Herbert Madinger*

Schweizerisches Katholisches Sonntagblatt 24/2013